

aprilo 1970
63-a jaro
n-ro 773 (4)

esperanto

oficiala organo de

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)

nieuwe binnenweg 176 - rotterdam-3002 - nederlando - redaktoro: v. sadler



U.N.
en
perspektivo

Vi trovos

la promesitan ĉef-artikolon pri la konkretiĝanta programo de la Universala Kongreso en Vieno. Ankaŭ la programo de antaŭ- kaj post-kongresaj aranĝoj en la landoj najbaraj al Aŭstrujo estas aparte ampleksa ĉi-jare: Brno, Prerov, Opava, Bratislava, Augsburg, Maribor, Linz, Graz, Bad Hofgastein, Praha, Budapest... la elekto estas vere vasta!

Se vi mem ne havos eblecon ĉeesti la Kongreson en Vieno, vi eble turnos vin al la radio por ricevi novaĵojn pri ĝi dum la kongresa semajno. La artikolo de radio-amatoro Richard Wood sur p. 58-59 certe helpas al vi atingi la plej bonan aŭskultadon de la Esperanto-stacioj.

Se vi ja ĉeestos, vi eble renkontos tie novajn vizaĝojn de gejunuloj ekstudiantaj Esperanton antaŭ nur kelkaj monatoj — per la programita kurso de Hermann Behrmann. Leginte pri la plej novaj rezultoj de lia agado (p. 54), eble ankaŭ vi decidus subteni ĝin finance. Se jes, bv. relegi la detalajn informojn en la decembra numero de "Esperanto".

Enhavo

- 53 Eksterkutima kongreso preparata
- 54 Unuiĝintaj Nacioj — hodiaŭ kaj morgaŭ ("Homo")
- 54 3550 kursanoj
- 55 Ne ĉiam kulpas la tajpistino...
- 56 Pseŭdonimo "Amiko" — ĉu ankaŭ de Zamenhof? (Ginz)
- 58 Kiel fariĝi radio-aŭskultanto (Wood)
- 60 Informoj de CED
- 61 Recenzoj
- 62 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj)
- 62 Leteroj de legantoj
- 62 Forpas-aĝero
- 63 Loke-Fake-Persone (mallongaj novaĵoj)
- 64 55a Universala Kongreso, Vieno, 1970
- 64 Memore al Hector Hodler
- 64 Antaŭ 50 jaroj
- 65 Esperanto en radio
- 66 Pola junularo kaj NEJO-komisiono invitas vin (TEJO)
- 66 Oficiala informilo n-ro 433; nova financa subteno
- 68 Anoncetoj

La kovrilo

La verda vitro de la domo de Unuiĝintaj Nacioj estas unu el la vidindaĵoj de Nov-Jorko kaj "deviga" vizito-celo por ĉiu turisto. Antaŭ la domo flirtas la flagoj de la daŭre plimultiĝantaj ŝtatoj-membroj de UN. La artikolo sur paĝoj 54-57 pririgardas la nunan evolu-staton de la organizaĵo kaj ĝian rilaton al la celado de la internacia Esperanto-movado.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Ned. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo"

Aperas monate (escepte de aŭg.)

Abonprezo por unu kalendara jaro 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por aerpoŝto aldonu: Aŭstralio kaj Nov-Zelando 13,75 gld. jare; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Usono, Meks. 5,50; Israelo 2,75.

Anonc-tarifo: 1 paĝo = 285 gld.; 1/2 p. = 150 gld.; 1/4 p. = 85 gld.; 1/8 p. = 50 gld.; 1/16 p. = 35 gld. Kliŝokostoj ekstreme. Ripet-rabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefona: (010) 23 27 88.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-3006.

Legantoj en 84 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Brit. Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj lernejoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, Germanujo. Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: S-ro U. J. Moritz, D-5161 Merken, Andreasstr. 57, Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: S-ro J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris (17e), Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonaĵoj: S-ro J. Uŝpienski, p/a PEA, ul. Jasna 6, Warszawa 1, Polujo.

Estrarano pri financoj kaj administrado: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Ned.

ĈKSTERKUTIMA KONGRESO PREPARATA

Ĉu Vieno bezonas popularigon? Verŝajne ne, ĉar ĝia famo de unuaranga kultura kaj scienca centro kun neimiteblaj atmosfero kaj spirita klimato estas mondvasta. En Vieno la historio de Eŭropo prezentigas en koncentrita formo, kaj, malgraŭ ke la nuntempo reflektas daŭran sociprogreson, la gastama popolo aparte talenta por muziko kaj belarto konservas la tradiciojn, kiuj formas ĝian vivmanieron. La ideala situo ĉerande de Alpoj kaj apud la Danuba bordo logas vojaĝemulojn same laŭokazajn kaj hazardajn kiel ankaŭ rutinajn. Ne mirinde do, ke ankaŭ la tutmonda esperantistaro alvojaĝos Vienon ĉi-somere por solene, labore, distre kaj turisme ĉeesti la 55-an Universalan Kongreson de Esperanto (1-8.8.1970). Sub la Alta Protektado de d-ro Franz Jonas, ŝtatprezidanto de Aŭstrujo, kiu mem flue parolas Esperanton, jam antaŭ pluraj monatoj komenciĝis la respondeca laboro de la Loka Kongresa Komitato.

Kongresejo en la centro

Por la Kongresoj estis elektita "Sofiensäle", situanta proksime de la historia urbocentro kaj facile atingebla per pluraj linioj de la amastransportiloj. Ĝia ĉefa salonego por 2200 personoj kaj aliaj malpli grandaj ejoj (de 50 ĝis 500 personoj) ebligas okazigon de preskaŭ ĉiuj programeroj en unu sama konstruaĵo. Aliloke kunvenos la kongresanoj nur por la Inaŭguro, Teatro kaj Bankedo. Por malpli problema orientiĝo de la kongresanoj ĉiuj antaŭe ricevos detalan urboplanon. La prezaro en la kongreslando tendencas al la ĝenerala okcidenteŭropa nivelo, tamen kelkrilate (ekz. restoraciaj manĝaĵoj) ĝi restas por turisto malpli kosta, ol en aliaj okcidentaj landoj. La loĝado por la kongresanoj estas rezervita en diverskategoriaj hoteloj, studentaj hejmoj, junularaj gastejoj kaj kampadejoj.

Laborkunsido de la Loka Kongresa Komitato en la oficejo de Aŭstria Esperantista Federacio en Vieno. Organizo de granda internacia Kongreso postulas respondecan kaj sindediĉan laboron kun detala disdivido de la taskoj inter la komitatanoj.



Du teatroj invititaj

La kongresprogramo estas finpretigata kaj jam eblas raporti pri la ĉefaj punktoj. Inter la tradiciaj programeroj elstaras la Ĝeneralaj Kunvenoj de UEA, el kiuj la dua traktos la temon "La Internacia Lingvo kiel instrumento por eduko al internacia konceptado de la mondo (okaze de la Internacia Jaro de Edukado)". Por la Internacia Somera Universitato alvenis 19 sinproponoj el 10 landoj. La teatraj prezentadoj, kiuj havas aparte signifan lokon inter la kulturaj aranĝoj, plenumiĝos en la klasikstila Raimund-teatro. Invititaj estas la Silezia Teatro el Opava (Ĉeĥoslovakio) kaj la Bulgara Esperanto-Teatro. La unua venos kun lirika versdramo "Manon Lescaut", la alia kun folklora komedio "La virina regno".

Specife vian karakteron promesas la oficiala bankedo en la luksa "Kursalon" en la urbocentro. La abunda menuo konsistos el tipe aŭstraj specialaĵoj, kiuj sendube akiros bonan reputacion ankaŭ inter la kongresanoj. Konsiderante la pozitivajn eĥojn de la lastjara kongreso en Helsinki, denove enprogramiĝas la t.n. "Junulara Tago", kun interesaj programeroj sub la gvido de TEJO. Ankaŭ la kongresa Debato, gajninta multajn simpatiojn lastjare, reenviciĝos. La ĉi-jara diskut-temo estas "Konflikto de generacioj: ĉu realaĵo aŭ preteksto?". Nove aperos koncerto de la ĵus establita Internacia Orkestro. Por talentuloj sur kampo literatura, oratora aŭ filmarta okazos internaciaj konkursoj kun valoraj premioj. Tre allogan programon prezentas la kongresorganizantoj al tiuj, kiuj deziras trarigardi la kongreslandon kaj kongresurbon turisme. Gvidate de Esperanton parolantaj spertuloj oni rigardos interesajn lokojn el vidpunktoj politika, historia, kultura, religia kaj naturbeleca. Menditaj estas komfortaj aŭtobusoj por veturigi la kongresanojn al ĉarmaj, romantikaj kaj pitoreskaj regionoj de la kongreslando. Du paroj da neoficialaj ekskursoj vastigas la eblecojn por tiuj, kiuj volus profiti sian restadon por plia libertempado en Aŭstrujo aŭ eĉ salti por tri tagoj al la najbarlandaj ĉefurboj — Budapeŝto kaj Praha. Dum pluraj preferos daŭrigi la kongresadon en Linz (Oficiala Postkongreso), la gejunuloj iros al sia 26-a Internacia Kongreso de TEJO en Graz. Post lastjaraj malsukcesoj en la organizado de internaciaj Infankongresetoj, ĉi-foje ĝia efektivigo estas garantiita. La ferioestadejo Hörndlwald apud Vieno gastigos 40 infanojn el deko da landoj.

En la momento de la redaktado aliĝis pli ol 1300 kongresanoj el 38 landoj. Multaj konas Vienon de post la Eŭropa Konferenco en 1965, sed tamen ili decidis reiri al ĝi. Ĉar Vieno, vivanta urbo, havas vizaĝon kiel homo. Ĝi estas ĉiam renkontinda. Ĝi signifas poezion kaj vibrantan vivomelodion. Al siaj vizitantoj ĝi prezentas valorajn donacojn: ĝojon kaj intiman travivaĵon per vera beleco. Al esperantistoj ĝi krome proponas eksterkutiman kongreson en unika kadro.

UNUIĜINTAJ NACIOJ - hoo

Unuiĝintaj Nacioj estas 25-jara. La 6-a de junio, 1945, estas la dato de la subskribo de la Ĉarto de UN. En ĉi tiu artikolo nia kunlaboranto pri-skizas, interalie per konkretaj ciferoj, la amplekson de la problemoj, kiujn frontas UN en sia jubilea jaro. Inter tiuj problemoj estas ankaŭ la lingva, kiu ĉi tie ricevas apartan atenton en ligo kun la agado de UEA ĉe UN.

Flirtas brave en la nov-jorka vento 126 ŝtataj standardoj, ĉiaj koloroj brilaj en unika spektaklo. Partoprenas en la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj (UN) la ŝtataj reprezentantoj preskaŭ el la tuta mondo. Neniam ĝis antaŭ nelonge tia afero estis videbla en la monda historio. Vizitantoj senĉese venas al Novjorko por vidi la ĉefsidejon de UN. Ĉarmaj gvidistinoj klarigas al ili pri la 626 seĝoj en la centra salonego, kie debatas kaj decidas 270 delegitoj kun ĉeesto de 270 observantoj, 235 ĵurnalistoj kaj 800 vizitantoj.¹

Ĉe la muroj, koridoroj kaj en eksteraj ĝardenoj estas diversnaciaj pentraĵoj, fotografaĵoj, statuoj kaj similaj, kiujn klarigi pretas la multlingvaj kaj diverse vestitaj belulinoj. Por ni estas aparte


1. Ciferoj el 1968.

menciinde, ke troviĝas ankaŭ Esperanta vitrino prizorgata de la Esperanto-Klubo de UN-oficistoj. (Oni demandu pri ĝi, okaze de la vizito.)

Elstaras la laborejo de la Sekretariato 150 metrojn de sur la pavimo fronte al la flagostangoj. Tiu neornamita, modernstila konstruaĵo enhavas 39 etaĝojn, kie laboras pli ol 3 mil oficistoj. Kolorplena, diverskostuma kaj multlingva estas la homamaso videbla, kiam la oficistoj eniras por labori. Sed ne estas nur afero de pitoreska kontrasto inter la abundaj roboj kaj la ĉiam mallongiĝantaj jupej usonaj. UN frontas profundajn problemojn por eviti tion, ke la 25-jara jubileo (en la jaro 1970) de ĝia naskiĝo ne estu ĝia mortotago aŭ komenco almenaŭ de malkresko.

Ekzistas abismoj inter la opinioj pri la administrado en la problemoj de financoj, lingvoj ktp. kaj inter opinioj pri la esenca karaktero de UN mem, ĉu UN havu nur limigitan povon, aŭ ĉu ĝi fariĝu vere monda registaro. Ekzemple, kelkaj el tiuj argumentoj estas: (1) ke ĉe UN mankas efika pacprotektita policforto, ĉar ankoraŭ nun ekzistas milit-minaco en kelkaj lokoj, kvankam UN jam savis la mondon kelkfoje de katastrofaj militoj, (2) ke, en la Sekureca Konsilantaro kaj la Ĝenerala Asembleo, estas maljuste, ke la ŝtato de 200 000 000 da nacioj havas nur unu voĉdonrajton same, kiel tiu de 6 000 nacioj, kaj, sekve, (3) ke por la grandaj ŝtatoj estas malavantaĝe pagi grandan kontingenton, dum malgrandaj ŝtatoj pagas nur etan sumon. Preskaŭ ĉiu ŝtato pripensas, ne kion ĝi povas kontribui al UN, sed kion ĝi

3550 kursanoj




La 'invado' Behrmann en Israelon ankoraŭvastiĝas. El 3550 personoj nun jam partoprenantaj (en 38 landoj de la mondo) la germanlingvan programitan kurson de la juna instruisto el Löhne, FRG, ĉirkaŭ 400 troviĝas tri mil kilometroj for, en Israelo. Artikolo de Behrmann aperis en la gazeto Ma-Ariv la 8an de januaro 1970, en 118 000 ekzempleroj. Letero de d-ro H. Mašler, fak-delegito en Tel Aviv, aperis poste sub la rubriko "leteroj de legantoj".

Laŭ la vortoj de d-ro Mašler: "Post la unua ondo de telefon-vokoj venis pli ampleksa ondo de leteroj, pli ol 100 el la tuta Israelo. Dum la dua leciono de mia kurso la salono estis plen-plena, kaj mi havas nun la plej bonan kurson ĝis nun, laŭ la inteligenteco de la lernantoj. Israela Radio turnis sin al mi kaj petis intervjuon. Rezulte mi parolis pri Esperanto 40 minutojn. La plimulto de la aŭskultantoj estis junuloj."

Pli ol la duono de la kursanoj de Behrmann tra la mondo estas lernejoj kaj studentoj. Ĉ. 210 estas instruistoj. Inter diversaj aliaj profesioj estas eĉ karcer-direktoro. Ĉirkaŭ 400 personoj jam finstudis la tutan 4-partan kurson.

Plue vastiĝas la instru-kampanjo lanĉita de Hermann Behrmann antaŭ nur unu jaro. La aŭtoro (foto) ankoraŭ daŭre respondas inform-petojn. Tuj aperos la angla eldono.

aŭ kaj morgaŭ



Ke la influo de Unuiĝintaj Nacioj necese restas ĉefe nur morala, tion evidentigas ĉi tiu diagramo, kiu komparas la buĝetojn de tri landoj (Usono, Nederlando kaj Japanujo) kun tiu de la monda organizaĵo.

povas gajni. La delegitoj malofte pensas pri la tuta homaro.

NRO kaj UEA

UEA estas inter la 350 neregistaraj organizaĵoj (NRO), kiuj apartenas al la Komitato pri Neregistaraj Organizaĵoj. La Komitato staras rekte sub la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro, kiu estas unu el la 3 Konsilantaroj de UN.

Por UEA, M. Starr kiel delegito kaj M. H. Gerson kiel vicdelegito, komisiite de la prezidanto Ivo Lapenna, estrarano pri la eksteraj rilatoj, havas permeskarton por eniri la ĉefsidejon de UN, aŭskulti spertulojn kaj ĉefoficistojn, ĉeesti la ĉiusemajnan informkunvenon kaj peti informojn en la nomo de UEA. En informkunvenoj oni traktas problemojn ekzemple pri rifuĝintoj, limigo de nukleaj armiloj, esplorado de la kosma spaco, internacia regado de polusaj regionoj, purigo de la maro, ktp. Foje, kiam oni diskutis pri buĝeto, ili publike petis informon pri la kostoj de diverslingveco.

En decembro 1968, en la Kvina Komitato, kiu okupiĝas pri administrado kaj buĝeto kaj kiu rilatas rekte al la Ĝenerala Asembleo, la sovetuniaj reprezentantoj faris premon por la rusa lingvo kiel labora lingvo. Tiam, oni en la nomo de Esperanto-Inform-Centro (ELNA) sendis personan leteron kun CED-dokumento RDC/7 al ĉiuj 126 ŝtataj delegacioj ĉe UN por atentigi ilin pri la kreskado de la multekosta lingva labirinto kaj pri la neglekto de la ĝenerala sekretario U Thant pri la UEA-propono prezentita en la jaro 1966. (Pri NRO mem ekzistas diversaj opinioj. Kritikis ilin kelkaj naciaj burokratoj, kiuj en siaj landoj ne agnoskas la rajton kaj bezonon de neregistaraj organizaĵoj. Iuj asertas, ke kelkaj el la neregistaraj organizaĵoj ricevas subvenciojn sekrete de iu ŝtata spionfako aŭ entreprenas politikan agadon.)

Financaj malfacilaĵoj de UN


Krom la kreskantaj problemoj kaj taskoj, UN havas kreskantan oficistaron. Laŭ raporto de U Thant, pli ol 8000 personoj devas labori en la oficejoj ĉefe en Novjorko kaj Ĝenevo, adekvataj nur por 3

Ne ĉiam kulpas la tajpistino . . .

Ekzistas tra la mondo centoj da diversaj markoj de skribmaŝinoj. Kaj la nombro de diversaj klavaroj estas preskaŭ same granda: ĉiu modelo havas iajn diferencojn rilate la aranĝon de la literoj kaj simboloj antaŭ la tajpisto. Ĉiuj, kiuj havas okazon tajpi per diversaj maŝinoj, tre bone scias, kiel ĝenaj estas tiuj diferencoj kaj kiom da nenecesaj tajperaroj ili kaŭzas.

Almenaŭ unu paŝo direkte al la forigo de tiaj diferencoj estas lastatempe farita. Aperis nova rekomendo de la Internacia Organizaĵo por Normigo (ISO) — interŝtata organizaĵo, kiu klopodas atingi kiel eble plej grandan unuecon en ĉiaj aspektoj de tekniko, mezuroj kaj administraj kutimoj. La teknika komisiono ISO/TC 95 klopodis normigi la poziciojn, nombron kaj disdividon de la klavoj sur la liter-tabulo de skribmaŝinoj kaj similaj aparatoj. Dudek sep landoj jam aprobis ĝiajn rekomendojn.

Ĉu tio signifas, ke baldaŭ regos plena harmonio en la maŝinskriba mondo? Bedaŭrinde la afero ne estas tiel simpla! Simpla ĝi ja estus, se en la tuta mondo ekzistus nur unu lingvo... sed tion malmultaj deziras, ankaŭ ne la Esperantomovado. Tiel longe, kiel ekzistos diversaj lingvoj



kun diversaj alfabetoj aŭ almenaŭ — inter la lingvoj kun latina alfabeto — diversaj signitaj literoj, same longe, verŝajne, regos diverseco ankaŭ ĉe la maŝin-klavaroj. Internaciaj oficistoj, kiuj laboras sinsekve jen en Parizo, jen en Vieno, jen en Ankara, devos barakti kun ĉiam novaj klavaroj ornamitaj per la literoj supersignitaj, subsignitaj aŭ tute apartaj de la unuopaj landoj.

La rekomendo ISO/R 1091 ne estas solvo. Sed ĝi almenaŭ donas la esperon, ke por unu sama lingvo la skribmaŝinaj firmoj adoptos unuecan klavaron, kaj eĉ, ke ankaŭ internacie regos iom malpli da kaoso, ol ĝis nun.

Pseŭdonimo "Amiko"

-ĉu ankaŭ de Zamenhof?

La emo de Zamenhof al uzo de pseŭdonimoj multe komplikis la vivon de liaj biografoj. Ankaŭ por literatur-studentoj tio restas grava diskutaĵo.

O. Ginz Mi revenas al tiu problemo, levita de N.Z. Maimon, ĉar ne temas ja nur pri listo de pseŭdonimoj, sed pri eventuala plimultigo de originalaj poemoj de Zamenhof. Vekis la problemon la poemo "Al la Esperantisto", subskribita per la pseŭdonimo "Amiko".

Grabowski en sia "La liro de la Esperantisto", aperinta en 1893, citis inter la Zamenhofaj poeziaĵoj ankaŭ la supran poemon, kiu aperis unue en la gazeto "La Esperantisto" en la jaro 1889 kaj estis tie subskribita per la pseŭdonimo "Amiko". Dietterle, en sia "Originala verkaro" el la jaro 1923, enmetis ĝin sen plua kontrolo en la verkojn de Zamenhof kaj notis kiel fonton "Liron" de Grabowski.

Al N.Z. Maimon komence (Vidu: Monda Kulturo, p.13) sufiĉis tiu indiko, sed post informo de O. Ginz (Monda Kulturo, p.84) ke "Amiko" = Kofman, Maimon (Monda Kulturo, p. 137) alportis amason da novaj argumentoj. Unue "Amiko" povis esti pseŭdonimo de ambaŭ, Zamenhof kaj Kofman, kaj aldone li citas kvin lokojn el Zamenhof-poemoj, parencaj laŭ enhavo al tiu en la poemo "Al la Esperantisto". Kaj lia fina argumento estis: ke laŭ noto de Baghy en la Esperanto-Enciklopedio komenciĝis la Esperanto-periodo de Kofman en 1892.

Ĉu tio sufiĉas? Ĉu oni ne povas konstati laŭ tiu simileco fakton alian? Ke Kofman estis fidela Zamenhofa epigono*, kiu ensorbis liajn ideojn, al kiu estis tre proksimaj liaj publike prezentitaj esprimoj kaj kiu, mem denaska poeto, penis en siaj unuaj paŝoj imiti sian majstron. Tamen estas neeble pensi, ke tiu epigoneco lin povus instigi eĉ al imito de pseŭdonimo — kiu laŭ Maimon estas Zamenhofa — kiun li ekde tiam ofte uzis. Kaj koncerne noton de Baghy: Estas iom dubinde, ĉu la talentega poeto Baghy estas konsiderota ankaŭ

* epigono — ĉi tie uzita en senco: sekvanto aŭ imitanto de eminentuloj en literaturo aŭ aliaj artoj.

UNUIĜINTAJ NACIOJ

-hodiaŭ kaj morgaŭ

kvaronoj de ili. Rilate al la sidejoj, Sovetunio, Saŭdi-Arabio, Kamboĝo ktp. jam proponis translokigon al aliaj, politike pli neŭtralaj landoj. (Estus eble konsideri, ke la situo de la centra sidejo de UN en Usono favore influis la disvastiĝon de la angla/usona lingvo dum la pasinta dudeko da jaroj.) Pluraj ŝtatoj-membroj ne volas akcepti planon por pliampleksigo de la konstruaĵoj en Usono.

La ĉefa kaŭzo de stagnado de laboroj ĉe UN estas la ĉiame restanta deficito. Ankaŭ lingvo-instruado por la oficistaro kostas proksimume 700 000 dolarojn jare.² Kelkaj ŝtatoj daŭre rifuzas pagi militajn elspezojn de la subite organizitaj UN-armeoj en Kongo ktp., kaj malriĉaj ŝtatoj ne volas pagi eĉ la asignitajn sumojn por la ordinara buĝeto. Nuntempe en UN estas manipuloj kiel ne repagi la ŝuldojn. Pro tio oni eldonas obligaciojn.

Gravaj planoj neefektivigataj

En UN kaj ĝiaj suborganoj estas gravaj projektoj internaciaj: (1) projektoj kontraŭ venenigo de la aero, riveroj, oceanoj fare de la modernaj industrioj, (2) projektoj kontraŭ danĝeraj drogoj, (3) projektoj limigi la nukleajn armilojn kaj kontroli kemiajn kaj biologiajn armilojn, (4) projektoj utiligi la oceanojn kaj iliajn fundojn, kiuj kovras grandan parton de nia terglobo, (5) projektoj kontraŭ nescio, malsato kaj malsano, ktp. Preskaŭ ĉiuj eblaj internaciaj aŭ mondaj problemoj estas pri-traktataj de diversaj nacioj ĉe UN.

Kaj kelkaj gravaj planoj efektiviĝis: la interkonsentoj pri la utiligo de la eksteraj tavoloj de la

U Thant,
61-jara,
komencis
sian karieron
kiel lernej-
estro kaj
nun okupas
unu el la
plej influaj
oficoj en
la mondo.



atmosfero, pri la protektado de la astronautoj, pri evito de milita uzo de la planedoj. En 1966, oni malpermesis enorbitigi armilojn.

La dekoj da komitatoj produktas senfine longajn raportojn. En gravaj konferencoj oni diskutas pri la industriigo de evoluantaj landoj, pri la mondskalaj planoj por la nutraĵoj, pri naskolimigo, pri analfabeteco, ktp.

Sed estas paradoksoj, ke, malgraŭ la paroladoj, raportoj, diskutoj, kreskas la diferenco inter la riĉaj ŝtatoj kaj la malriĉaj, kaj ke grandaj ŝtatoj elspezas multon por sia armado, dum ili nur malmulton pagas al UN.³ Multe da paroloj kaj facilaj

2. "La jura pozicio de lingvoj sub la reĝimo de Unuiĝintaj Nacioj", Ivo Lapenna, "La Monda Lingvo-Problemo", p. 105, 106, vol. 1, n-ro 2, 1969.

3. Ekzemple, Usono, dum ĝi pagis al UN proksimume 41 000 000 da dolaroj, elspezis jare por defendo 80 000 000 000 (en 1968). Aliaj ŝtatoj simile, proporcie.

historiisto de la movado. Krome povas esti, ke lia iom nepreciza karakterizo de Kofman: "Unu el la eminentaj Esperanto-poetoj de la unua periodo (1892-1904)" ne signifas, ke Kofman poetiĝis precize en la jaro 1892 kaj ne tri jarojn antaŭe, ke li jam tiam ne prezentis senpacience al la unua numero de "La Esperantisto" sian unuan verkon. Por decido ni turnu nin al Zamenhof mem.

Altrudita aŭtoreco

Ni prenu en la manojn la "Fundamentan krestomation de la lingvo Esperanto de d-ro L. L. Zamenhof", kies unua eldono aperis en 1903 kaj kiu enhavas ĉiujn liajn poemojn. Inter ili ne estas la poemo "Al la Esperantisto". Ne povas esti intencita pretervido, por kiu ĉiu motivo mankas, nek temas pri forgeso, ĉar Zamenhof certe konis sian poezian verkaron kaj ankaŭ la kolekton "Liro", en kiu tiu poemo aperis kun la eksplicita noto pri aŭtoreco de Zamenhof.

Zamenhof do neniam pretendis esti aŭtoro de tiu poemo. Nin misgvidis la bonfida publikigo en "Liro".

Restas ankoraŭ demando, kial Zamenhof post eldono de "Liro" ne defendis sin kontraŭ tiu al li altrudita aŭtoreco. Klarigon povas eble prezenti

Antoni Kofman
(1865-1940?),
rusa pioniro,
kontribuis al
Fundamenta
Krestomatio.



jeno: Kvankam li en 1889 tolereme akceptis por la ekaperinta "La Esperantisto" de la entuziasma Kofman lian unuan verkon kaj eĉ aldonis sian germanlingvan tradukon al ĝi, pli poste al li ekmalplaĉis la okulfrapaj imitaĵoj. Ne akordiĝis tamen kun lia milda karaktero, ke li eĉ per plej eta aludo montru sian malkonsenton. Por aliri la radikojn de la eventuala eraro, mi petis skribi mian malnovan amikon Baghy pri klarigo pri la demando, kion signifas la jaro 1892 en lia artikolo pri Kofman. Mi venis malfrue. Malsano de Baghy jam tro progresis tiam kaj li ne plu povis min respondi.

akceptoj de konvencioj. Sed plejofte ne estas ia oficiala konfirmo, nek efektiva aplikado. Ne estas escepto ankaŭ la Konvencio pri Genocido, akceptita en 1948.⁴ La Internacia Kortumo de Justico ankaŭ restas senpotenca, ne havas rimedojn por deviga plenumado de verdiktoj, kaj la ŝtatoj povas ne akcepti ĝian jurisdikcion.

Baras la ŝtata suvereneco

Kompare kun la ŝtataj standardoj flirtantaj fronte al la ĉefsidejo, la standardo de UN sola simbole elstaras pli alte. Malgraŭ tio, la konscio de homara unueco kreskas nur tre malrapide.

U Thant, en sia oficiala prelego je 19 septembro 1968, diris, "Bedaŭrinde neniu registaro volas akcepti direkton el la aliaj ŝtatoj, aŭ fari aŭ akcepti ian limigon de sia ŝtata suvereneco." Sed, ĉar estas klare, ke denova monda milito signifas la sindetruon de la homaro, li kaj la subtenantoj de UN favoras praktikajn kunlaborojn por solvi la problemojn, kiuj urĝe koncernas ĉiujn popolojn, ne nur de la ŝtatoj-membroj, sed ankaŭ de la ne aliĝintaj ŝtatoj. En tio estas nenecesaj la konfliktoj ideologiaj, kiuj nur malŝparas tempon.

Albert Einstein (1879-1955) en sia artikolo pri la atombomboj eksplicite diras, "Dum suverenaj ŝtatoj posedas grandan potecon, militoj estas neeviteblaj." Supozeble UN transprenos laŭgrade iom el la ŝtata suvereneco por la bono de la tuta homaro. Ĝis nun pluraj grupoj de fakuloj pri juro jam provis verki konstitucion de ia monda organizo aŭ modifi la nunan Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj por mondogfederacio aŭ pli efika formo de Unuiĝintaj Nacioj.⁵ Post 25 jaroj da ekzisto kaj spite de eraroj, UN restas tamen iom da espero por la homaro.

Kion ni povas fari?

Preskaŭ por ĉiu UEA-ano estas eble kontakti kun la UN-informejo en la propra regiono kaj montri ekzemple la Esperantan tradukon de "Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj", kiu estis akceptita en la Ĝenerala Asembleo de UN en 1948.

Bedaŭrinde kelkaj burokratoj, prestiĝaj poliglotoj nun ne helpas la alprenon de la Internacia Lingvo. Ili verŝajne timas iam perdi sian oficon aŭ profitas iel el la lingva diverseco. Aliflanke, en UN oni intencas stimuli la lingvo-lernadon per specialaj krompagoj por la oficistoj, kiuj kapablas uzi plurajn laborajn lingvojn.² En tia situacio, UEA, kiel unu el la neregistaraj organizaĵoj registritaj ĉe UN, povus montri pacience kaj takte la utilecon de Esperanto ĉe la lokaj UN-grupoj.

Kvankam la Sekretariato de UN neglektis ĝis nun iniciati agon laŭ la UEA-propono, ankoraŭ restas por ni eblecoj, ekzemple klopodi ĉe la ŝtatoj-membroj. Ni povas esti certaj, ke la lingvaj problemoj ĉiam kreskas en UN, kaj ke, se ĝi uzas la Internacian Lingvon en ĉiu sia fako, en ĉiutaga administrado, ĝi sendube pli bone funkcias en la solvado de la nunaj problemoj, ĉu internaj, ĉu eksteraj, kiuj lastaj grave rilatas al la tuta homaro. "Homo"

4. "Kultura genocido kaj homaj rajtoj", Ivo Lapenna, "Esperanto", n-ro dec. 1968

5. a) R. M. Hutchins k.a., "Proponita Konstitucio de la Mondo", Universitato de Chicago, 1947(?). (Artikolo 43: "Dum tri jaroj de sia fondiĝo la Federacia Registaro nomos unu lingvon, kiu fariĝos bazo por formulado kaj interpretado de la federaj leĝoj...")

b) G. Clark kaj L. B. Sohn, "Proponita Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj", Harvard University Press, 1958.

Facile estas, instigi al regula aŭskultado de la Esperantaj radio-stacioj. Multaj tre volonte sekvus tiajn instigojn aŭ eĉ sopiras aŭdi esperantlingvan paroladon per radio. Sed por la plimulto, kiu kutimas ĉiutage ŝalti sian transistoran ricevilon kaj tuj aŭdi forte kaj senĝene la lokan aŭ landan radio-stacion, la kaptado de eksterlandaj stacioj estas kvazaŭ granda scienca problemo. Ĉar kelkajn jarojn ni devos atendi, ĝis la rekta (kaj perfekta) ricevado per satelitoj de kiu ajn stacio de la mondo jam estos realaĵo, Richard Wood proponas ĉi tie kelkajn praktikajn konsilojn por radio-laikoj. La aŭtoro estas delegito de UEA en Honolulu, kaj samtempe aŭtoro de "Shortwave Voices of the World" (eld. Gilfer).

Kiel fariĝi

Antaŭnelonge atingis nin la malĝojiga informo, ke grava radiostacio en Eŭropo ĉesigis elsendojn en la internacia lingvo, ĉefe pro manko de reago ĉe la aŭskultantoj.

Des pli multe, do, ni atentu la tutmondajn radio-staciojn, kiuj daŭre elsendas en Esperanto, por eviti refojan okazon de tia sendoĉeso. Se la tutmonda esperantistaro ja fakte aŭskultos la elsendojn kaj reagos al ili per leteroj, la stacioj konsideros eĉ plilongigon aŭ plioftigon de la nunaj disaŭdigoj.

Baza scio necesa

Necesas agadplano, kaj la agado devas baziĝi sur elementa praktika scio pri la principoj de radio-aŭskultado, tiel, ke ĉiu esperantisto povu profiti de la nunaj elsendoj. La bazaj faktoj estas facile lerneblaj kaj praktike uzeblaj.

En la rubriko "Esperanto en Radio" de ĉi tiu revuo, oni trovas horaron de elsendoj. Ni tuj dividu en du grupojn — lokajn kaj internaciajn. Kvankam la disaŭdigoj de stacioj kiel Stoke-on-Trent, Valencia, Rosario estas ja valoregaj kontribuoj al la disvastigo de Esperanto en iliaj respektivaj landoj aŭ regionoj, la tutmonda esperantistaro ne malŝparu tempon, serĉante tiajn lokajn elsendojn. Ni konsideru, do, ĉefe la internaciajn elsendostaciojn, precipe de Varsovio, Bern, Roma, Sofia kaj Pekino.

Mallongaj ondoj uzataj

Krom la grava mezonda elsendo de Varsovio (200 metroj, 1502 kHz, aŭdebla en la tuta Eŭropo), ĉiuj elsendoj estas mallong-ondaj. Serĉu, do, la skalon de mallongaj ondoj en via radioaparato. Indiko ofte estas "SW", "OC" aŭ "KW". Do, ne interesas nin la ceteraj frekvenczonoj, ekzemple mezondoj (MW, OM), longondoj (LW, OL), aŭ la frekvencmodula zono (FM, VHF, UKW, MF). Se via ricevilo kovras nur tiujn lastajn tri zonojn, serĉu alian aparaton! Kaj laŭeble ĝi estu fortike konstruita, neportebla ricevilo. Ankaŭ sufiĉe aĝaj radioaparatoj bone taŭgas, ofte eĉ pli bone, ol la plej modernaj, kiuj malhavas kurtondan zonon kaj krome ne estas fortikaj aŭ stabilaj. La novaj porteblaj aparatetoj ĝenerale ne estas rekomendindaj, pro nesufiĉa distingo-kapablo inter najbarfrekvencaj stacioj, malĝustaj skal-indikoj, nestabileco.

Oni indikas frekvencojn en kilohercoj (kHz), sur la plej novaj riceviloj, aŭ en kilocikloj sekunde (kc/s), kaj krome ofte reciproke en metroj (M). Vi

"Nur etendu simplan draton de la antenkonekto ĝis fora punkto, prefere ekster la domo kaj laŭeble alte, ekzemple al alia domo..."

Ilustris: Agnes Lukács



radio-aŭskultanto

de
Richard
Wood

serĉu, prefere, ricevilon, kapablan ricevi la sek-
vajn kurtondajn zonojn:

MHz(Mc/s)	17	15	11	9	7	6
M	16	19	25	31	41	49
(MHz = mil kHz)						

El tiuj, en Eŭropo, la zonoj de 25-49 metroj (6-11 MHz) estas la plej gravaj. Tiuj zonoj estas internaciaj radiofoniaj zonoj, kaj preskaŭ ĉiu elsendo, kiun vi serĉas, estas trovebla rekte en ili (escepto: kelkaj el Pekino). Forgesu, do, la sufiĉe larĝan frekvencaron inter ili, kiu estas plenplena de neradiofoniaj stacioj.

Trovu la ĝustan frekvencon

Trovinte jam amason da apudaj radiofoniaj stacioj, elsendantaj paroladojn kaj muzikon, vi tuj rekonos internacian zonon. Restu en ĝi, kaj serĉu la deziratan Esperantan stacion. Malfeliĉe, nur malofte vi trovos, ke la skal-indiko de via ricevilo estas sufiĉe ekzakta tiel, ke vi povu ŝalti ĝin tuj al la dezirata ĝusta frekvenco. Sed vi povas juĝi la proksimuman lokon en la koncerna zono, baze de la etendo de ĉiu zono. Jen la etendo de la plej gravaj zonoj:

49-metra zono:	5950 - 6200 kHz
41-metra zono:	7100 - 7300 kHz
31-metra zono:	9500 - 9770 kHz
25-metra zono:	11700 - 11970 kHz

Ekzemple, evidentas, ke la ĉefa frekvenco de Svisa Radio sur 49 metroj, 6165 kHz, estas sufiĉe apuda al la alt-frekvenca fino de la zono, kie la radiofoniaj stacioj plejparte ĉesas kaj denove aŭdeblas ĉefe bruaj, neradiofoniaj signaloj. Aliflanke, la frekvenco de Bern sur 31 metroj, 9535 kHz, estas apud la malalt-frekvenca fino de tiu zono. La frekvenco de Sofia, 5920 kHz, estas eĉ ekster la oficiala sendozono, sed tre apude, kaj eĉ pli facile trovebla, ĉar estas malpli da aliaj stacioj en la najbaraj frekvencoj.

Kiun frekvencon vi prefere serĉu? Komplika demando, sed jen kelkaj principoj. Somere kaj dumtage, t.e., dum tempo de maksimuma taglumo, vi serĉu la plej altan uzatan frekvencon (en kHz), se vi volas kapti sufiĉe long-distancan stacion. Ekzemple, dum la tagmeza elsendo de Bern, la frekvenco 9535 kHz — la pli alta el la du frekvencoj uzataj por Eŭropo — donas fidindan ricevon el la tuta Eŭropo. Samhore, pli malalta frekvenco, 6165 kHz, estas ricevebla nur en Svislando mem kaj en najbaraj landoj. Aliflanke, vespere, 6165 kHz bonege kovras la tutan Eŭropon, la mediteranean regionon, kaj vintre atingas eĉ la orientan marbordon de Nord-

ameriko. La frekvenco 9535 kHz tiam jam estas tro alta por kovri la najbarajn landojn de Svislando; — oni serĉu ĝin tiam ĉefe en pli foraj landoj de Eŭropo, ekzemple Britujo, Skandinavio, Turkujo, kaj en orientaj kaj eĉ centraj partoj de Nordameriko kaj Mezameriko, en Azio kaj Aŭstralio.

Sama principo regas la ricevon de plurfrekvenca stacio kiel Varsovio. La uzataj frekvencoj varias de sezono al sezono, sed ni diru, ekzemple, ke du zonoj, 25 kaj 41 metroj, estas uzataj por du elsendoj; unu, posttagmeze (je 15.30 en la grenviĉa horo, t.e. 17.30 h. en Varsovio), kaj la alia, matene (je 05.30 h. grenviĉe, aŭ 07.30 h. en Varsovio). La frekvenco 25 metroj estas rekomendinda por matena aŭskultado en orienta Eŭropo, kiam jam estas lume, sed ne por okcidenta Eŭropo, dum la posttagmeza disaŭdigo, ĉar ja ankoraŭ ne estas mallume tie, krom eble dum vintro. La frekvenco 41 metroj donas bonan servon matene, nur al la regiono de mallumo; tiel, do, se aŭskultanto en orienta Eŭropo sentas, dum la elsendo, malfortiĝon de la signalo, li transiru al la pli alt-frekvenca zono, 25 metroj. Krome, se okazas interfero, oni ĉiam provu ĉiujn aliajn uzatajn frekvencojn kompare.

Rekonu la staciojn

Multaj radiostacioj havas muzikan aŭ alispecan rekon-signalon, kiun ili elsendas dum kelkaj minutoj, ĝenerale 3-5 minutoj, antaŭ la programkomenco. Tio ebligas facilan trovon de la stacio, kaj rapidan komparon de la ricev-kvalito de pluraj samtempe uzataj frekvencoj. Radio Varsovio, ekzemple, uzas kelkajn erojn de komponaĵo de Chopin; Pekino, la unuan strofon de la melodio "Ruĝas la Oriento"; kaj Roma, la kanton de eta itala birdo.

Kelkaj stacioj, ĉefe Pekino kaj Bern, havas direktitajn elsendojn al diversaj kontinentoj. Ili ĝenerale aŭdeblas dum la vespero en la ricevzono. Ekzemple, eŭropa aŭskultanto ne malŝparu tempon serĉante la elsendon de Pekino je 11.00 aŭ 12.30 h. grenviĉe, t.e. tagmeze en Eŭropo, sed, malgraŭ la distanco, li plejverŝajne bone sukcesos kapti la vesperan elsendon, direktitan al Eŭropo.

Pri antenoj

Necesas efika, sed simpla kaj nemultekosta anteno. Ne necesas aĉeti specialan antenon, kiel por televido. Nur etendu simplan draton de la antenkonekto (A) de via ricevilo ĝis fora punkto, prefere ekster la domo kaj kiel eble plej alte, ekzemple al alia domo aŭ al arbo, kun porcelana izolilo inter la antenfino kaj tiu domo aŭ arbo. Etendu la draton for de la strato, kie preterpasas brukaŭzaj aŭtomobiloj, kaj de elektraj motoroj kaj aliaj fontoj de interfero. Kelkaj porteblaj riceviloj malhavas antenkonekton, sed havas internan, ofte etendeblan antenon. Tiu foje funkcias bone, sed oni povas krome eksperimente aldoni dratpecon al la pinto de la eltirebla anteno, se tio ne malstabiligas la ricevon. Interna anteno absolute ne funkcias bone en ŝtalbetona konstruaĵo. Tie, minimume, oni metu la ricevilon tuj apud fenestro, se tute neeblas konstrui eksteran antenon.

INFORMOJ DE CED

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO
PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middx., HA9
8TF, Britujo. Telefono (01) 904 4081.

Dokumentoj nun presitaj

La dokumentoj de CED en la angla lingvo de nun aperos ĉiam en presita formo, anstataŭ stencilite. La unuaj ofsete presitaj dokumentoj estas jam pretaj kaj baldaŭ disiros al la regulaj ricevantoj: Unesko-komisionoj, bibliotekoj, internaciaj organizaĵoj kaj aliaj gravaj instancoj.

Utiligo de artikoloj LMLP

La artikolon de prof. I. Lapenna "La situation juridique des langues sous le régime des Nations Unies", el la dua kajero de la revuo "La Monda Lingvo-Problemo", CED sendis kun kvarlingva akompana letero al la delegacioj de la ŝtatoj-membroj ĉe Unuiĝintaj Nacioj. La artikolon de ambasadoro Ralph Harry "The language problem in diplomacy" CED sendis kun dulingva letero al diversaj ambasadoj en Nederlando. Pluraj el la ricevintoj esprimis grandan interesiĝon. CED rekomendas al la landaj informaj fakoj simile utiligi la artikolojn de LMLP por efika informado en apartaj medioj.

Esperantlingvaj elsendoj en 1969

Laŭ la statistiko, ellaborita de s-ro G. Larglantier, kunlaboranto de CED por la radio, la nombro de ĉiuj radio-elsendoj en la Internacia Lingvo en 1969 estis 4 133, kompare kun 2 416 en 1968, 2 014 en 1967, 2 290 en 1966 kaj 1 807 en 1965. Tio ĉi estas la plej granda nombro de elsendoj, ekde kiam CED komencis statistiki ilin, kaj tre verŝajne en la tuta historio de la Esperanto-Movado. La elsendoj entute daŭris 1 089 horojn, kompare kun 853.20 horoj en 1968, 715 horoj en 1967, 769.30 horoj en 1966 kaj 662.50 horoj en 1965. Ankaŭ rilate la daŭron de la elsendoj, la jaro 1969 estis rekorda en la historio de la Esperanto-Movado.

La nombro de stacioj estis 16 en 14 landoj, kompare kun 18 en 14 landoj en la jaro 1968. El la listo de radio-stacioj, kiuj pli frue regule elsendadis, bedaŭrinde malaperis Budapeŝto ekde la fino de februaro 1969. Aliflanke, Helsinko disaŭdigis en Esperanto ĉiusemajne de marto ĝis julio, kaj ĉiutage dum la Universala Kongreso. La nombra kresko de elsendoj ŝuldiĝas al Radio Varsovio: ĝis oktobro ĝi havis ĉiutage 3 elsendojn po 30 minutoj, kaj post oktobro 2 elsendojn po 30 minutoj, sed ekde novembro aldoniĝis la 7-8 anguletoj dum nacilingvaj elsendoj. Tiamaniere tiu stacio havis entute 1 924 elsendojn kompare kun 680 en la pasinta jaro. El aliaj stacioj aparte menciindaj estas tiuj de Pekino kun 312 elsendoj, Berno kun 208 elsendoj, Sofio, Manilo kaj Stoke-on-Trent, ĉiu kun 104 elsendoj.

CED ankoraŭfoje insiste rekomendas al ĉiuj aŭskultantoj de la elsendoj en Esperanto skribi al la koncernaj stacioj kaj komenti la elsendojn. Tio estas gravega por firmigo de la pozicioj de la lingvo en la radio kaj konsiderinde helpas la vastigon de ĝia uzo sur tiu kampo.

Esperanto en la publikaĵoj de Unesko

La Internacia Lingvo aŭ Universala Esperanto-Asocio estas ofte menciata en diversaj dokumentoj aŭ publikaĵoj de Unesko, ĉefe en ligo kun la agadoj de UEA aŭ intervenoj de ĝiaj reprezentantoj dum konferencoj de Unesko aŭ de NRO en konsultaj rilatoj kun tiu organizaĵo.

En ligo kun la Internacia Jaro de Edukado, en kiu partoprenas ankaŭ UEA, la periodaĵo de Unesko "International Education Year" publikigis du sufiĉe ampleksajn informojn: en n-ro 3 de oktobro 1969 aperis resumo de la programo de UEA por IJE; en n-ro 7 de decembro 1969 aperis informo pri la programo de ILEI por tiu jaro.

Enciklopedio de Esperanto


1. Parto A-Ĉ de la dua eldono de "Enciklopedio de Esperanto" estos verŝajne finpretigita dum la unua duonjaro de 1970. La redaktoroj, R. Haupenthal kaj U. Lins, kompreneble okupiĝas ankaŭ pri la ĉefaj artikoloj de la postaj partoj.
2. Kune kun prof. Ivo Lapenna kaj d-ro V. Sadler la redaktoroj nun prilaboras la duan eldonon de "La Internacia Lingvo. Faktoj pri Esperanto", por kiu oni povis vaste utiligi la ĝisnunan reton de kunlaborantoj de EdE. La verko estos prespreta ĝis la Viena Kongreso.
3. La ĉefredaktoro (Ulrich Lins, Gemarkenstr. 146, D-5 Köln 80, FR Germanujo) bedaŭrinde ĝis nun povis labori nur per pruntita unua eldono de EdE. Estus granda helpo, se bonvola esperantisto povus havigi al li ne plu bezonatajn ekzemplerojn de la du volumoj. Ankaŭ disponigo de aliaj verkoj, precipe esperantologiaj, kaj de gazetoj estas ĉiam bonvena.
4. La redaktadon, kiu postulas konsiderindajn elspezojn por afranko ktp., oni povas akceli per kontribuadoj al la Fondaĵo Enciklopedio de UEA.

Donacoj por CED

	£	ŝ	p
Stato je la 19-a de novembro 1969	104	12	0
S-ro E. Burg, Nederlando	0	5	10
Gesinoroj Kennedy, Britujo	5	0	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	34	0	0
S-ro E. Burg, Nederlando	0	5	10
S-ro Maurice Van Aelst, Belgujo	1	3	2
S-ro Louis Michaller, Francujo	0	10	4
Stato je la 31-a de decembro 1969	£ 145	17	2

Al ĉiuj donacintoj tutkora dankon. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj, aŭ la oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

Populara vortaro por komencantoj



Recenzas Simo Milojević (Beograd):

Oportuna vortaro de ordinara Esperanto, de Vilho Setälä. Helsinko: Fondumo Esperanto, 1969. 96 p. Ilus. Ofset. 15 cm. (Ovo-serio 2).

Mag. Vilho Setälä jam antaŭ deko da jaroj per sia bonega lernolibro "Privilegia Vojo" pruvis, ke

li apartenas al la plej kompetentaj pedagogoj en la Movado. Aparte atentindan trajton de tiu pedagogia aktiveco prezentas klopodoj ĉiam verki por la internacia publiko, per kio mag. Setälä en la plej bona senco daŭrigas la vojon, kiun siatemp signis la iom tro frue forgesita Cseh-metodo.

La nova, riĉe ilustrita volumeto de Fondumo Esperanto estas, simple - Plena Vortaro por Komencantoj. Verkita populare, sed kompetente kaj tre ofte sprite (ankaŭ ilustraĵoj), la nova vortareto plenrajte pretendas esti bona prepara ŝtupo por la uzo de Plena Vortaro mem. Se oni povus konvinki la pedagogojn pri la pli ol ĝusta kredo de mag. Setälä, ke "al posedo de viva lingvo kondukas nur studo sentraduka", la nova vortareto baldaŭ elĉerpiĝus.

La verko, kiu portas n-ro 2 en Ovo-Serio de Fondumo Esperanto, ŝajnas esti stranga "ovo", ĉar la flavo kaj blanko interŝanĝis lokojn (flava plasta bindo), sed ĝi impresas altrange. Pensante pri la antaŭ nelonge aperinta legolibro de mag. Auld, oni povas diri, ke ni en nelonga tempo ricevis du bonegajn lernilojn por la internacia uzo. **Mendu ĉe UEA: 3,25 gld. + sendokostoj 10 %.**

De lingvo ideala al lingvo reala

Recenzas Ulrich Lins (Köln):

Historio de la japana Esperanto-movado, de Miyamoto masao. Kioto: l'omnibuso, 1969. 46 p. 25 cm.

Per tiu tre instrua studo la aŭtoro celas forigi du gravajn mankojn: la tendencon de japanoj "ne rekte kontakti kun la internacia movado" kaj la neadekvatan prezenton de la japana movado en eŭropaj manlibroj pri la historio de Esperanto. Miaomoto nun sukcese plenigas tiun delonge sentatan breĉon, des pli ĉar li ne limigas sin al neŭtrala kroniko, sed zorge ellaboras ankaŭ la socian fonon de la movado en sia lando.

La lingvo disvastiĝis dum pluraj jardekoj (pasintjare Japana Esperanto-Instituto festis sian Oran Jubileon) ĉefe dank' al la apogo de tri fortaj grupoj: Unue, sciencistoj, kiuj, strebante al internacia komunikado kaj grave suferante pro lingva diskriminacio, verkis studojn en Esperanto, precipe medicinajn kaj natursciencajn — laŭnombre multe pli ol siaj alilandaj kolegoj; due, socialistoj kaj liberaluloj, inter ili elstaraj pioniroj, kiuj same, pro la izoliĝo en sia lando, sopiris pli facilan aliron al la ekstera mondo; kaj trie, eĉ ultranaciistoj, en kies planoj Esperanto ludis certan rolon kiel batalilo kontraŭ la lingva imperiismo de anglosaksoj, ne tute sensukcese penante akordigi sian japanisman kredaron kun homaranismo. (Notinde, la persekutoj sub militismo trafis ne nur la duan grupon, sed ankaŭ reprezentantojn de la tria.)

Longan tempon Esperanto restis antaŭ ĉio ŝatata objekto de literatura kaj scienca interesiĝo, dum neglektiĝis la parola ekzercado. Nur post la mejloŝtona 50a UK en Tokio (1965), kiu unuafoje ebligis al centoj da japanaj esperantanoj la konversacian elprobadon, al la tri menciitaj elementoj aldoniĝis unu plia, tiu de la vivanteco de la lingvo: Nun-

tempe Esperanto estas vigle praktikata dum t.n. "kunloĝadoj" kaj vojaĝoj eksterlanden.

Kvankam la aŭtoro mem multe kontribuis al tiu evoluo "de lingvo ideala al lingvo reala", li ne kaŝas iom da malkontento pro la transiro de "vana rezisto" (kontraŭregistara opono) al "utila papagado" (de senideologiaj turistoj), esprimante la esperon, ke post tiuj multnombraj junaj komencantoj, kiuj nun inundas la japanan movadon, "iam aperos nova generacio, kiu sekvos la esperon de nia Majstro kaj batalos por lia ideo" aŭ kiu — en pli aktualaj terminoj — kredeble traktos Esperanton en ligo kun aliaj mondaj problemoj, kiel postulas — ĉu vojomonte ankaŭ por japanaj gejunuloj? — la Deklaracio de Tyresö.

Mendu ĉe UEA: Prezo anoncota.

I N F O R M E J O

Vi demandas — ni respondas

KIEL nomiĝas en Esperanto la naĝanta kaj subakviĝanta birdo, kiu vivas ĉe nordaj rokbordoj kaj similas la pingvinon ('alka' en la pola, 'alca' en la latina, 'alque' en la franca kaj 'Alk' en la germana)? Ĉu eble la nomo troviĝas jam en la nova Plena Ilustrita Vortaro?

Respondo: En "Bildlibro pri bestoj" (1961) kaj "Esperanto-English Dictionary" de Butler (1967) aperas la termino 'alkao'. Tamen en PIV aperos, kun la aprobo de Ornitologia Rondo Esperantlingva, la termino 'aŭko', kaj ĝi troviĝos ankaŭ en la baldaŭ aperonta "Nomaro de eŭropaj birdoj".

Laste aperis. . .

la longe atendata "Alfabeto katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Vien". La peza volumo I ampleksas 462 paĝojn kaj la literojn A ĝis L, sed akompana noto malĝojige anoncas, ke pro la morto de Hugo Steiner la parto II jam ne aperos.

Sub la titolo "La hombildo de diversaj religioj" Oomoto jam eldonis en 36-paĝa broŝuro la referaĵojn el la tiutema "Interreligia Kunveno Esperantista" okazinta en la kadro de la UK en Helsinki. Alia kunven-raporto estas tiu de la 4a Seminario por Gvidantoj, kiun aranĝis TEJO en 1969 (18 p., mimeo.).

Ĉeĥoslovakujo produktis laste du broŝurojn: "Kio estas MEM", eldonita de la Ĉeĥoslovaka sekcio de Mondpaca Esperantista Movado kaj ilustrita per kontraŭ-militaj karikaturaj, kaj "Česká Trebová", turisma broŝuro pri la samnoma urbo. Al aliaj komercaj foiroj propagandataj pere de Esperanto aldoniĝis ĉi-jare ankaŭ la Foiro de Milano. Aperis afiŝo pri la foiro 14-25 aprilo.

Tri novaj libroj el Vjetnamujo: "Kan Lik" estas romano de Ho phuong, 320-paĝa; "La drinkejo de l' mutulo" estas novel-kolekto de Nguyen sang, 187-paĝa; la tria. "La vjetnama kaj ĝia utiligo por la supera instruado en V.D.R." estas neordinara libro inter la eldonaĵoj de Hanojo kaj entute en la Esperanta literaturo. Recenzo sekvas.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libro servo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la prezon en guldenoj. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj.

Grave efikas bona afiŝ-arto

Skribas Günter Conrad (Munkeno):

Efektive la belartoj helpas en varbado, kiel diras s-ro Nikolov (decembro, p. 181). Mi volus aldoni jenajn konsilojn. Evitu naivajn memfaritajn varbfoliojn. Legu atente la anoncan parton de via gazeto. Analizu iujn anoncojn (de firmoj ktp). Provu kompreni, kial ili plaĉas aŭ ne plaĉas al vi. Uzu modernajn formojn kaj modernajn literojn en viaj afiŝoj. Afiŝoj estu viglaj. Ne uzu nur verdan koloron! Veku scivolon kaj promesu personan avantaĝon jam en la titolo: "Viaj venontaj ferioj estos per Esperanto pli belaj!" aŭ simile.

Ni lernu el libroj de varbfakuloj. La anglalingva libro de David Ogilvy "Confessions of an advertising man" (konfeso de varbfakulo) aperis germanlingve ĉe Econ-Verlag kaj en la serio Heyne-Taschenbücher. Interesaj estas la portugallingvaj poŝlibroj "Como tornar-se desenhista de publicidade" (kiel fariĝi reklam-desegnisto) kaj "Elementos do desenho publicitário", kun multaj ilustraĵoj. Ili aperis ĉe eldonejo Edições de ouro, Rio de Janeiro.


Kongresoj tro kostaj?

Skribas Stanislaw Rudnicki (Varsovio):

Alproksimiĝas la Universala Kongreso, ĉijare en mezo de Eŭropo. Sed la Kongreso estas treege multekosta. Kaj unuavice la kongreskotizo. Kio do estas la kongreso de esperantistoj? Kongreso estas unuaranga propagandilo por interna kaj por ekstera, kaj ĝi devas esti kiel eble plej atingebla. De iom da tempo la UK fariĝis profitdonanta entrepreno por UEA, do kontraŭe fariĝis malpropagando. Estas ja klare, ke UEA — aranĝanto de UK — devas nepre iel vivi, tamen ne koste de propagando.

Respondas la redaktoro:

Ĉu vere UEA "profitas" el la Universalaj Kongresoj? Povas esti, ke la enspezoj fine superas la kostojn, kvankam pri tio oni rajtas dubi. Sed granda parto de la enspezoj iras ĝuste — laŭ la kongresa regularo — al la Propaganda Konto. La Kongresoj estas certe unu rimedo por diskonigi Esperanton, sed ili plej ofte okazas en eŭropaj landoj. UEA estas monda organizaĵo kaj bezonas monon por disvastigi Esperanton en monda skalo, precipe tie, kie ĝis nun ne ekzistas landa movado, kaj kie ne povas okazi Universala Kongreso.



Kion pagas la kongres-kotizoj?

(La liveradon de "Esperanto" al kongresanoj-nemembroj kovras specialaj krompagoj de tiuj samaj UK-anoj.)

FORPAS-AĜERO

Kiam la 79-jara nederland-devena monaĥo Cornelis Wijnands mortis antaŭ nelonge en la misiejo de la Sankta Koro en Coogee (Aŭstralio), liaj proksimuloj sendis al la superulo de lia ordeno en Nederlando jenan anglalingvan telegramon: "Brother Wijnands passed away" (Frato W. forpasis.). Tuj venis el Nederlando la respondo: "By which flight?" (Per kiu flugo?). Necesis tria telegramo por klarigi, ke ĉi-foje frato Wijnands ne foriris per flugmaŝino.

(Laŭ "Het Vrije Volk", 4.11.69)

LOKE -

FAKE -

PERSONE

LOKE

Britujo

● En Folkestone, suda Britujo, okazos de la 1a ĝis la 3a de majo jam la 8-a "Markola Kongreso". Adreso: S-ino J. E. Hawker, 66 Black Bull Road, Folkestone, Kent.

Francujo

● En "L'Europe en formation", la ĉefa franca gazeto de la eŭropa federisma politiko, aperis granda parto de la festoparolado de prof. Lapenna farita en la UK en Helsinki, en traduko de la vic-delegito de UEA en Bordeaux, s-ro P. Marly.

Hungarujo

● En la ĉi-jara Somera Esperanto-Universitato de Gyula (5-11 julio 1970) prelegos i.a. Reto Rossetti, István Szerdahelyi kaj prof. Ivo Lapenna.

Peruo

● En la ĉefurbo Lima okazas samtempe du kursoj: en Instituto de Jogo kaj en Y.M.C.A.

Soveta Unio

● La litova Esperanto-pioniro d-ro A. Poška verkas en Esperanto 300-paĝan libron "Ni ĉiuj estas fratoj", pri sia tutmonda vojaĝado pere de Esperanto kaj la delegita reto de UEA. En ruslingva traduko de prof. D. Armand ĝi aperos en 1971 ĉe moskva eldonejo "Mijsl".

Sud-Afriko

● En Johannesburg la konstrufirma LTA Ltd. projektis novan komplekson kun butikoj, apartamentoj, oficejoj k.a. kaj donis al la tuto la nomon "Esperanto Shopping Centre". La nomon oni elektis pro la internacia karaktero de la kvartalo, en kiu loĝas enmigrintoj el Nederlando, Germanujo, Italujo kaj Portugalujo.

2°05'N). ~io. Regiono antikva persa imperio.

onomo de virino.

ziza, malbone difinita: la ~a oni^K.

vo de Tanzanio.

mase interpuŝe

en: sur la

uniformoj

popolaj

oj^Z;

sur

Sved/o^Z. Ano de la ĉefgento, loĝanta en ~ujo. ~a. Rilata al ~oj aŭ al ~ujo: la ~a seriozeco, klimato, politiko, neŭtraleco; ~a ledo. ~io, ~ujo, ~lando ✱ Reĝlando en la orienta parto de la skandinava duon-insulo (Stokholmo, 18°01'E, 59°20'N).

svelt/a @ Harmonie aŭ elegante maldika: la vulpo vane provis manĝi el la ~a vazo^K; la ~a turo de la minareto; ~a junulino; ~aj kruroj. ~eco. Eco de iu, io ~a. ~iga. Destinata fari iun ~a: ~iga dieto, kuracado.

*sven/i (ntr). 1 Perdi dum kelkaj momentoj la konscion k movkapablon: la mal-sanulo ~is, rigardante la preparojn al la operacio^Z; la bela Sara kuŝis ~inte^Z; ĉiu arelo malbonodoras tiel, ke la homoj ~as ~u odoro^Z. 2 (f) Malaperi, disperdiĝi: ~is ĉe la sunleviĝo; la ĉarmo de la ~e ~as en ĉi tiu traduko. ~o 1.

Supre:

Fragmento el la paĝo 1053 de Plena Ilustrita

Vortaro, nun jam preskaŭ fin-presita.

Intertempe ankaŭ la Ilustra Parto estas preskaŭ tute preta (desegnado finita, aparta bild-indekso kompilita ktp.).

FAKE

Filatelo

● La Asocio de Ĉefaj Filatelitoj fondis Esperanto-sekcion kun propra organo "Zpravodaj" (Informilo), de kiu tri numeroj jam aperis. Adreso: Vláda Hasala, S.K.N. 37, Hodonín, Ĉeĥoslovakujo.

Politiko

● "El Popola Ĉinio" anoncas, ke baldaŭ aperos en Esperanta traduko la Unua Volumo de "Elektitaj verkoj de Maŭ Zedong". La volumo ampleksos verkojn el la jaroj 1924 ĝis 1937.

Ŝipkomerco

● Laŭ informo en londona ŝipkomerca gazeto, "Lloyd's List" (17 mar. 70), la firma Esperanto Shipping Corporation, Monrovia, Liberio, aĉetis je la 16a de marto 1970 la motorŝipon "Domsheide" (10 692 krudajn tonelojn; kargokapacito 15 313 t.) kaj ĝin renomis "Esperanto". La ŝipon, konstruitan en Emden en 1957, vendis K. G. Fisser & K-jo, Bremen. Kiel konate, jam ekzistas pola ŝipo "Zamenhof".


PERSONE

Kalocsay

● Al d-ro Kálmán Kalocsay la Hungara PEN-Klubo aljuĝis sian honor-medalon pro lia multjardeka ampleksa traduklaboro por diskonigi en Esperanto la hungaran literaturon. En la domo de Asocio de Hungaraj Verkistoj solene prezentis la medalon konata hungara verkisto László Passuth. Pri la verkado de Kalocsay parolis Mihály Gergely, redaktoro de "Hungara Vivo". La solenajon ornamis ĥorkantado en Esperanto kaj deklamado el tradukoj de Kalocsay.

Maldekstre: arĥitekta desegnaĵo pri la baldaŭ konstruota "Butik-Centro Esperanto" en Johannesburg (vidu: Sud-Afriko). Krom butikoj kaj superbazaro, la projekto ampleksas loĝkvartalon, oficejojn kaj benzin-stacion.

ESPERANTO SHOPPING CENTRE





ŜANCO POR KVAR INFANOJ

55a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Vieno, 1 - 8 aŭgusto 1970

Alta protektanto: Franz Jonas,
Prezidanto de Aŭstrujo.

Konstanta adreso:

Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

La urbo invitas kongresanojn

Oficiala akcepto ĉe la urbestro de Vieno, s-ro Bruno Marek, estas antaŭvidata por la kongresa mardo, la 5-an de aŭgusto 1970 je la 16-a horo en la Urbodomo. Kiel anoncote, s-ro Marek apartenas al la membroj de la Honora Komitato de la Kongreso.

Premioj pro la lernado

Laŭ ĵusa decido de la LKK de la 55-a UK ĝi invitas po unu infano (6-13 jaraj) el Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Hungarujo kaj Pollando por senkosta partopreno en 11-a Internacia Infankongreseto en Vieno. Tion ĉi oni dankas al la malavaraj kontribuintoj por la fondaĵo Adoptaj Gepatroj. La elekto okazos konkurse inter la plej diligentaj lernantoj de la Internacia Lingvo.

Dudek-kvara oficiala kongresperanto

S-ro Jehiel Ben-Alter (P.O.B. 379, Petah Tikva, Israelo) fariĝis nova kongresa peranto de la UK de UEA. Li konsentis transpreni la taskon por Israelo kaj tiel helpi al popularigo en tiu lando de la ĉiujaraj mondaj manifestacioj de esperantistoj.

Kotiz-tarifo ekde la 31.3.1970:

	gld.
1) Kongresano neindividua membro de UEA	90,—
2) Kongresano individua membro de UEA	
kun Jarlibro	77,50
3) Kongresano individua membro de UEA	
kun Jarlibro kaj "Esperanto"	65,—
4) Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1)	63,—
5) Edz(in)o de Kongresano en kategorio	
2) kaj 3)	53,—
6) Junulo ĝis 20-jara	27,—
7) Universitata studento ĝis 30-jara	45,—
8) Blindulo	36,—

LKK ĝentile atentigas

En la lastaj semajnoj amasiĝas ĉe la adreso de LKK krom netrakteblaj kongresaliĝiloj ankaŭ leteroj petantaj ebligon de aliĝo sen samtempa pago. Kvamkam la kongresorganizantoj bone komprenas la situacion de la petintoj (precipe el orienteŭropaj landoj), tamen ili ne povas malobservi la kongres-regularon. La respondado en tiuj kazoj forrabas gravan tempon uzeblan por pozitivaj laboroj.

Statistiko (11.3.1970)

Alĝerio 2, Argentino 1, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 99, Belgujo 19, Brazilo 1, Brit. 86, Bulg. 70, Ĉeĥoslov. 18, Danlando 38, Finn. 40, Francujo 158, Gano 1, Germ. 113, Grek. 8, Hispan. 30, Hung. 21, Indonezio 1, Irlando 2, Israelo 8, Italujo 60, Japanujo 24, Jugoslav. 16, Kanado 6, Meksiko 1, Nederl. 88, Norveg. 8, Nov-Zel. 1, Pollando 53, Portug. 1, Rumanujo 3, Sud-Afriko 1, Sudano 1, Svedujo 79, Svisujo 24, UAR 2, Urugvajo 2, Usono 31.
Entute 1120 aliĝintoj el 38 landoj.

Lastmomente: 1237 aliĝintoj.

MEMORE AL HECTOR HODLER



"Li ne estis parolema. Lia tono estis rekta kaj aŭtoritata. Sub lia maniero iom abrupta regis profundaj bonkoro kaj delikateco." Tiel skribis Edmond Privat pri la homa flanko de sia amiko Hector Hodler tuj post lia morto, okazinta en la 31-a de marto 1920.

Siatempa prezidanto de UEA kaj direktoro de revuo "Esperanto", Hector Hodler forpasis en juna aĝo 33-jara pro tuberkulozo post longa suferado. Malgraŭ sia grava malsano, li redaktis ankaŭ la aprilan numeron (1920) de la revuo ĝis antaŭ 2-3 tagoj de la morto.

Jam paŝis 50 jaroj de tiam. Li estis unu el la fondintoj de UEA kaj postlasis al nia Asocio grandan kapitalon, per kiu UEA saviĝis de siatempa financa krizo. Omaĝe al li, en 1968 fondiĝis Kapitalo Hodler 68. Kaj dank' al sindediĉaj kaj helpemaj membroj, ĝi kreskadas ĝis nun sub la nomo Instituto Hodler 68, kiu estas jure aparta instanco, sendependa de UEA.

Antaŭ 50 jaroj

— en "Esperanto", n-ro apr. 1920

Tuberkulozo estas "unu el la plej danĝeraj malamikoj de la homaro." Triono de la mortintoj de 15-jara ĝis 60-jara aĝoj estas "viktimoj de ftizo."

En la artikolo "El historio kaj vojoj de la kontraŭtuberkuloza batalo" de kuracisto Blassberg en Krakovo troviĝas ankaŭ detalaj ciferoj. Antaŭ la 1-a monda milito, la "nombroj de ftizuloj, kiuj estas ŝarĝoj senproduktaj por la socio" estis jare en Germanujo, Britujo, Francujo, Italujo kaj Pollando inter 120 000 kaj 200 000, respektive.

"Kiel la homaro sukcesis venki la variolon," tiel same "per streĉo de fortoj kaj per progreso de kulturo ĝi sendube sukcesos konduki ankaŭ la kontraŭtuberkulozan batalon al venko," tiel prognozis la kuracisto.



La nombroj de la korespondadoj ricevataj kaj forsenditaj en februaro (1920) ĉe UEA estas 1045 kaj 1417 respektive.



ESPERANTO EN RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris 16, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1969, Unua Parto, p. 521. Mallongigoj: I = Informoj; P = Parolado; K = Kurso.

Ĉiutage

05.30-06.00 Warszawa, 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs). I.P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Warszawa, 42.11 m (7125 kcs), 31.45 m (9540 kcs).

Dimanĉo

11.00-11.30 Pekino, 47.69 m (6290 kcs), 40 m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
11.30-12.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
12.30-13.00 Pekino, 25.12 m (11945 kcs), 19.89 m (15080 kcs) I.
18.00-19.00 Sherbrooke, 102.7 Mcs (mod. frekv.). I. Le Globe Trotter, Radiostacio CHLT, 3330 ouest rue King, Sherbrooke (Québec), Kanado. (Kvarlingva programo pri turismo).
20.00-20.20 Roma, 50.08 m (5990 kcs), 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs). P. Radio , Roma, Esperantofako, Casella postale 320, Roma, Italujo.
20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
22.45-23.00 Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lundo

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs), I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua Sao Bento 245, Sorocaba (Sao Paulo), Brazilo.
12.20-12.30 Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 16.86 m (11795 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.
18.00-18.15 Stoke-on-Trent, 94.9 Mcs (mod. frekv.). K.I. Radio Stoke, Cheapside, Hanley, Stoke-on-Trent (Staffs.), Britujo. (la kvaran lundon de la monato, de 18.00 ĝis 18.30; kelkaj programoj en la angla).

Merkredo

12.20-12.30 Bern, kiel lunde. (S-ro C. Gacond).
13.45-14.00 Wien, 203 m (1475 kcs). P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo. (ĉiun alternan merkredon).
14.00-14.15 Stoke-on-Trent, kiel lunde.
23.05-23.30 Bilbao, 212 m (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Bilbao, Hispanujo.

Ĵaŭdo

21.50-22.00 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.27 m (9595 kcs), 25.25 m (1180 kcs), P. (D-ro Baur).
23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1133 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavujo.

Vendredo

18.30-19.00 Clermont-Ferrand, 90.4 (mod. frekv.) K. Centre de Télé-enseignement de la Faculté des Lettres, 29 bd. Gergorvia, F-63-Clermont-Ferrand, Francujo.
20.00-20.30 Pekino, 48 m, 45 m, 42 m, 38 m.

Sabato


11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
14.30-14.40 Rosario, 229 m (1310 kcs). P. Radio Nacional, Cordoba 1331, Rosario (Santa Fé), Argentino.
20.00-20.30 Pekino, Kiel vendrede.
21.50-22.00 Bern, Kiel ĵaŭde (S-ro Gacond).

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncitan ĉiutagan programon prezentas "Anguleton por Esperantistoj" dum la jenaj nacilingvaj programoj:
— dana merkrede inter 15.30 kaj 15.55 per ondoj 49 m, 41 m, la saman tagon inter 19.30 kaj 19.55 per samaj ondoj, kaj dimanĉe inter 12.00 kaj 12.30 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs);
— germana ĉiutage inter 07.30 kaj 08.00 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs);
— sveda marde kaj vendrede inter 20.30 kaj 21.00 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs), merkrede kaj sabate inter 7.00 kaj 7.30 per samaj ondoj.

ĜENERALA AŬDEBLECO

- stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urbo): Clermont-Ferrand, Muritiba, Rosario, Sherbrooke, Stoke-on-Trent, Sorocaba, Valencia;
 - stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj ĉirkaŭmediteraneaj landoj: Bern (75.28 m, 48.66 m, 31.46 m), Bilbao (aŭdebla en sudokcidenta Eŭropo), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Roma, Sofia, Warszawa, Wien (aŭdebla en centra Eŭropo), Zagreb;
 - stacioj aŭdeblaj en Azio: Pekino, (dimanĉe kaj sabate je 11.00 kaj 12.30 GMT);
 - stacio aŭdebla en Afriko: Bern (31.27 m, 25.25 m, 16.86 m, 13.94 m).
- Tio estas nur ĝenerala skizo, variigebla laŭ modelo de la ricevilo, atmosfera situacio, lokaj kondiĉoj diversspecaj.

NOTO: La stacioj Bern, Pekino, Roma, Warszawa regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.



TEJO-redaktoro:
Wim Jansen,
Röntgenstraat 32 A,
Vlaardingen,
Nederlando

Pola junularo kaj NEJO-

En la kadro de la 6-a Internacia Esperanto-Seminario en Torun (Pollando), tradicia aranĝo de Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj en Torun, okazos ĉi tiun jaron du seminarioj: (1) de la 26-a ĝis 27-a de julio, Seminario pri "La penso de Lenin kaj la internacia laborista movado": (2) de la 28-a ĝis 31-a de julio, Seminario por gvidantoj de TEJO pri "Internacia junulara turismo". Tiu ĉi lasta seminario havas la jenan riĉan kaj varian programon.

La 28-an de julio okazos tuttaga aŭtobusa ekskurso kun turistgvidado (esperantlingvaj eksplikoj) laŭ la "Piast-Trako": Torun - Inowroclaw - Kruszwica - Strzelno - Gniezno - Biskupin - Znin - Bydgoszcz - Torun. Entute estas ĉirkaŭ 300 km. En Bydgoszcz oni ĉeestos filharmonian koncerton.

La vera seminario pri internacia junulara turismo komenciĝos la 29-an de julio; ĝi anoncas enkondukajn prelegojn de Bakker ("Turismaj NEJOj kaj projekto de Internacia Turisma Centro en Amsterdamo"), Tonkin ("Internacia Junulara Kongreso de TEJO") kaj Grzebowski ("Agado de la Turisma Komisiono de TEJO, respektive Turisma Fakto de

Landa Sekcio de TEJO"). Krome oni aranĝas konkurson pri internacia junulara turismo, kaj el la senditaj referaĵoj estos prezentitaj la plej bonaj. Partoprenu ankaŭ vi la konkurson, ĉar premioj atendas vin! Surbaze de la prelegoj okazos diskutado pri la problemoj, kaj vespere renkontiĝoj kun NEJOj (Neesperantistaj Junularaj Organizoj) en la agrabla etoso de fajrejo en tendaro de la skoltaj trupoj "Amikeco", kiuj utiligas en sia agado ankaŭ Esperanton.

La 30-an de julio markas seminario pri "La lingva problemo en internaciaj junularaj rilatoj", pri kiu temo faros enkondukan prelegon Hans Bakker. Posttagmeze oni konkursos pri "Kion vi scias pri Pollando", okazos la fermkunveno de la seminario, akcepto de la konkludoj por la TEJO-kongreso kaj disdono de premioj. Vespere la adiaŭa balo.

Dum la posta tago tuttaga ŝipekskurso sur Vistulo portos la partoprenantojn ĝis la kuraĉloko Ciechocinek. La NEJO-komisiono de TEJO ege invitas vin partopreni, kaj ĝi faras tion ne nur pro la riĉa, supre priskribita programo; la partoprenkotizoj estas treege favoraj, ĉar por la du Seminarioj, programo, inkluzive de manĝoj, tranoktoj kaj ekskursoj oni pagos nur 10 usonajn dolarojn aŭ egalvaloron. Partopreninte en Torun oni facile povas vojaĝi al la kongresoj en Vieno kaj Graz.

Nova financa subteno

Oficiala informilo 433, 1 marto 1970

"POR LA PRESEJO"

La alvoko, kiu aperis en la februara numero de "Esperanto" sub la titolo "Helpu finmodernigi vian Centran Oficejon", ne estis vana. Jam dum februaro alvenis pli ol 20 donacoj, grandaj kaj malgrandaj, kaj la sumo kolektita "por la presejo" superis 5 400 gld. Kelkajn el la donacoj ni kvitancas en ĉi tiu numero (sub 'Oficeja Ilaro'), la aliajn ni konfirmos en postaj numeroj.

La plej granda unuopa donaco ĝis nun estas tiu de la Esperanto-klubo en Uddevalla, Svedujo, kiu kontribuis pli ol 6 000 svedajn kronojn, tio estas ĉirkaŭ 4 200 guldenoj. Tiu grandega donaco estis tiel surpriza kiel ĝojiga, kaj ni ŝuldas elkoran dankon al la klubanoj en Uddevalla. Tiu ilia donaco sola sufiĉas por pagi la duan stadion de la projekto, nome la aĉeton de fotografia aparataro, kaj intertempe la bezonata fotografilo (vertikala, por litografaj filmoj) jam instaligis en la C.O. Tuj kiam estos oportune, la Oficejo akiros ankaŭ la finan stadion de la maŝinaro: malgrandan presmaŝinon. En sekvonta numero ni denove raportos pri la laboroj entreprenitaj.

TESTAMENTO ENGELSHER

Jam je la sepa de oktobro 1960 mortis en Tel Aviv (Israelo) la membro de UEA, s-ro David Engelsher. S-ro Engelsher multe vojaĝis tra la mondo, ankaŭ al Universalaj Kongresoj, kaj havis amikojn plurloke. En sia testamento s-ro Engelsher decidis, ke kelkaj sumoj de la postlasita kapitalo iru al difinitaj personoj, sed ke el la resto estu formita "eterna fondaĵo" kaj ke la fruktoj de tiu fondaĵo iru duone al UEA kaj duone al Esperanto-Ligo en Israelo (ELI).

Pro diversaj malfacilaĵoj kaj komplikadoj, la fondo de la fondaĵo daŭris multajn jarojn. Sed fine en 1969 la fruktoj de "Fondaĵo Engelsher" komencis alflui al UEA kaj ELI. Tio signifas, ke komence ĉiu el ili ĉiujare ricevas sumon de minimume 600,— isr. pundoj kaj ke en ĉiu estonta jaro, ĝis 1978, tiu sumo iom kreskos. Nur nun, post kiam estas efektivigita la celo, kiun sinjoro Engelsher imagis, kiam li faris sian testamenton, ni publikigas tiun ĉi aferon, pri kiu ĝis nun sciis fakte nur la Estraro de UEA. Ni danke memoras, ke s-ro Engelsher dum sia vivo pripensis, ke por la farota laboro de UEA kaj ELI mono estas bezonata, kaj tial decidis favori UEA kaj ELI en sia testamento.

La nomo de s-ro David Engelsher estos en la Ora Libro de UEA.


E. J. Woessink,
estranaro pri financoj

komisiono invitas vin!

Se vi havas pli da tempo, nepre ankaŭ partoprenu la 2-an Internacian Kulturfestivalon de PEJ en Bialystok, okazonta antaŭ Torun, nome de la 21-a ĝis la 25-a de julio. Tie samtempe okazos ankaŭ komitatkunsidoj de STELO. La kotizo por ambaŭ aranĝoj en Bialystok, inkluzive de trajnbileto por rapida vagonaro Bialystok-Torun estas ankaŭ nur 10 dolaroj. Do dekunutaga partopreno en du interesaj aranĝoj kostas nur 20 dolarojn! Kaj se iu havas eĉ pli da tempo, valoras viziti Pollandon dum la tuta monato julio laŭ la jena programo: — 1-a ĝis 14-a: partopreno en Studenta Scienca Esperanto-Tendaro ĉe Bachotek-lago (Brodnic-lagaro); 15-a ĝis 20-a: vizitado de Varsovio; 21-a ĝis 25-a partopreno en Bialystok; 26-a ĝis 31-a: partopreno en Torun. La kotizo por tiu tutmonata restado en Pollando, inkluzive de vojaĝoj interne de Pollando estas nur 60 dolaroj!

Aliĝo laŭ ĉi tiuj favoraj prezoj eblas nur ĝis la 30-a de aprilo. La kotizon vi sendu al: NEJO-komisiono de TEJO, nome de Stichting Taalproblemen, poŝtĉekkonto 1497537, Amsterdam, Nederlando. Aliĝojn sendu al Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, Torun, Mickiewicza 6/10, Pollando. De tie vi ricevos detalajn informojn.

La NEJO-komisiono kore invitas vin!



Karakteriza arĥitekturo en Torun

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de junio neniu membro protestas pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Aŭstralio: Alice Pritchard, Redcliffe. **Aŭstrujo:** Josef Eder, Graz. **Belgujo:** Louise Vertongen-Xhayet, Eupen. **Brazilo:** Geraldo Pádua (VD), Jayme Zatar (JD), Belo Horizonte; Alvaro Rabêlo, Cascavel; Raul Conde, F. Rodrigues de Maraes Sobrinho (VD), Goiânia; A. F. Meyer (FD), Itapetinga; José Marcílio (FD), Juiz de Fora; Aderaldo Rocha (FD), D. Carvalho Villela (FD), A. H. Lima (FD), Rio de Janeiro; F. Souza Almada, Santos; A. de P. Soares, Teresina. **Britujo:** John Gbourne (VD), Wolverhampton. **Bulgarujo:** Š. Kukušev (FD), Peŝtera; Dimo Dimov (FD), Razgrad; I. G. Georgiev (FD), Tolbuĥin; V. St. Mitovski (FD), I. L. Todorov (FD), Trojan; Ĥristo Dolĉinkov (FD), Veliko Târnovo; Manol Ĉolev, Velingrad. **Danlando:** Bodil Torbell (FD), Kolding; S. Immerkaer, Odense. **Finnlando:** Börje Granqvist (FD), Helsinki; Eino Lehkonen (FD), Jyväskylä; Lasse Kivistö, Mäntsälä; Aili Lahtinen (FD), Tampere. **Francujo:** Fernand Charlet, Renée Mauchien (VD), Amiens; T. Yelland, Aspremont; Jacqueline Louys (FD), Besançon; Alexandre Maczkowski (FD), Brioude; René Isnardon, Cannes; Guy Bracquemond, Clermont-Fd; Vianney Harpet (FD), Lyon; André Gimbert, Rochefort-Montagne. **Germanujo:** Joachim Mauritz, Au; Dieter Kleemann (FD), Karlsruhe. **Hispanujo:** W. A.


Shanks, Vitoria. **Italujo:** Maria Brandimarte (FD), Ascoli Piceno; Vera di Tocco (FD), Roma. **Jugoslavio:** Ivan Mušec, Konjŝĉina; Don Oreb (FD), Vela Luka; Bernard Stipaniĉ (FD), Zadar. **Kanado:** Philip Trubey (FD), Ottawa; W. G. du Temple, Sidney; E. Apine-Grundsteins, Victoria. **Koreujo:** Jonghun Kŭak, Taegu. **Nederlando:** Eduard Borsboom (FD), Utrecht. **Nov-Zelando:** Desmond Langman (FD), Christchurch. **Pollando:** Alojzy Turek (VD), Kraków. **Portugalujo:** Leonel Gruz (FD), Queluz. **Sovetunio:** Algimantas Vizgirdas, Klaipeda. **Svedujo:** Bertil Bengtsson (VD), Hallsberg; Karl Härnqvist, Greta Härnqvist (VD), Vimmerby. **Tunisie:** M.-T. Lloancy, Sfax. **Usono:** C. Wayne Duffield, St. Petersburg; Jean Buck, San Jose.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1969)

Britujo: Edinburgh (FD aŭtomatoj); Gloucester (FD). **Finnlando:** Karttula. **Francujo:** Vieux-Thann. **Germanujo:** Hamburg (JD). **Jugoslavio:** Beograd (FD sporto). **Kongo:** Kinshasa (VD), (FD turismo). **Nederlando:** Amsterdam (FD studentaj aferoj); 's Hertogenbosch. **Svislando:** Luzern (D); Urnäs. **Usono:** Brooklyn (FD aŭtomatoj); New York (VD).

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Grossmann, s-ro A., Bethoncourt, Francujo. Pollard, s-ino G., Rossmoyne, Aŭstralio. Sawicz, s-ro S., London, Britujo. Wesson, s-ino A., Athol, Mass., Usono.



S. Jansanjau,
Korpus 148 D,
Penza-5,
Sovetunio,
26-jara mongolo,
deziras
korespondi.

Anoncetoj

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Kiu havas malnovajn numerojn de "Esperanto kaj Kulturo", "El Popola Ĉinio", "Voĉoj el Oriento", "Belga Esperantisto", "Paris Esperanto" kaj "Esperanto Kiboŝa". S-ro R. Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Kataluna Antologio. Tri neuzitaj ekz. de tiu multe serĉata libro retrovitaj! Ricevos ilin tiuj, kiuj proponos la plej altan prezon ĝis la limdato 15 junio 1970. Libroservo de UEA.

Ĉu vi libertempos en Ĉeĥoslovakio? Petu unue informojn ĉe la Turisma Servo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Korespondado internacia. Amikeco, vojaĝoj, kolektadoj, ktp. Sendu vian vizaĝfoton, aĝon, lingvojn parolatajn per filatele afrankita letero al: Mondklubo Paris 2000, B.P. 379, Paris (R.P.), Francujo.

Senpage nekatolikoj povas ricevi revuon "Vojo Vero Vivo" kun informoj pri la katolika religio. Eldono de "Internacia Katolika Informejo". Skribu vian adreson al: I.K.I., Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

Historio ne ripetiĝas, kaj tamen vi povas salte veni al Finnlando - kongreslando 1969! 145-paĝa Kongresa Libro de Helsinki fariĝos interesa dokumento en via librokolekto. Reduktita prezo 1,80 gld. aŭ 4 int. rpk. (ink. sendokostojn). Mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

Esperanto-Grupo de Avignon planas letervesperon pri la temo: "Kiu evento en la jaro 1969 plej ŝokis, konsternis aŭ indignigis vin?" Amase skribu al: S-ino Humm, Chemin des Neuf Peyres, F-84-Avignon, Francujo.

Filatelistoj! Ni proponas al vi poŝtmarkojn je duona prezo! Vidu la artikolojn en "Esperanto", 1969, p. 89 (majo) kaj 1970, p. 11 (januaro).

Ferioj kun senco. Ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu la antaŭ-Elsinoran semajnon (11.7-18.7.70) en la feria centro Kosmos en Danlando. Prelegoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i.a. pri Esperanto-problemoj. Feriado en bela dana naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus-Instituto, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94-96, DK-2000 Kopenhago F., Danlando.

Multaj geesperantistoj de 10- ĝis 65-jaraj serĉas fidelajn geamikojn en la tuta mondo. Skribu al instruistino St. Majerczak, Kroszienko nad Dunajcem, Pow. Nowy Targ, Kingi 6, Pollando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: KSM, 12, rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Amosevej 5 A, Kopenhago 2700 Brh. daŭre akceptos ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

Oficiala informilo

(daŭrigo de p. 67)

Svedujo. 166 Beard, s-ro R. H.; 167 Nelson, s-ro W. C.; 168 Oehler, s-ro R.; 169 Palermo, s-ro V.; 170 Pool, s-ro J., Usono.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1970

125 Cross, s-ino D.; 126 Hockey, f-ino M. J.; 127 Knight, s-ino E. B.; 128 Laurie, s-ro E. J.; 129 Phelan, s-ro H. K.; 130 Seddon, s-ino R.; 131 Sinclair, f-ino P. C., Britujo; 132 Rude, s-ro V.; 133 Zacho, s-ino B., Danlando. 134 Ihander, f-ino O. M.; 135 Vilkki, s-ro J.; 136 Vuolo, s-ro L., Finnlando. 137 Beaucaire, s-ro L.; 138 Bechtold, s-ro L.; 139 Wingen, s-ro W.; 140 Wuenschel, s-ro H. P., Germanujo. 141 Enriquez, d-ro A., Hispanujo. 142 Lacalendola, prof. A.; 143 Minnaia, s-ro L.; 144 Sgroi, s-ro R., Italujo. 145 Clark, f-ino M. A.; 146 Maier-Bevel, s-ino A. L.; 147 Price, s-ro K. F., Kanado. 148 Coppens, s-ino A. B. M.; 149 Kat, s-ro F. H.; 150 Wekker, f-ino E. L., Nederlando. 151 Ahlström, f-ino M.; 152 Almén, s-ro P.; 153 Björklund, s-ro F.; 154 Enström, f-ino M. L.; 155 Fingalsson, s-ro B.; 156 Gustafsson, s-ro K.; 157 Hedlund, s-ino I.; 158 Jensie, s-ino M.; 159 Lundin, s-ro H.; 160 Möllestad, s-ro S.; 161 Pettersson, s-ro F.; 162 Rydberg, s-ro H.; 163 Sjöberg, s-ro H.; 164 Snarberg, s-ro J.; 165 Tell, s-ro L.,

DONACOI (Gld.)

Fondajo Canuto (Por membrigi personojn en landoj kun transpagaj problemoj): Germanujo: Bormann, d-ro A., 5,—; Nederlando: Sadler, d-ro V., 30,—, Schippers, s-ro H. M., 15,—; Svedujo: Waldén, f-ino K., 30,—.

Fondajo Oficeja Ilaro: Hispanujo: Gomez Martin, s-ro F., 7,50 (por la presejo); Nederlando: Muniksma, s-ro F., 10,— (por la presejo); Slot, s-ro R., 100,— (por la presejo); Sutton, s-ro G. H., 25,— (por la presejo); N.N.: 30,—; 10,— (por la presejo); N.N.: 750,88.

Ĝenerala kaso: Britujo: Davies, f-ino H., 25,70; Nov-Zelando: McNamara, s-ro M. L., 80,—; Svislando: De Sassi, s-ro M., 2,50; Usono: Pollock, s-ro E., 11,82; N.N.: 10,80.

Patrono A de TEJO: Germanujo: Bulla, s-ro V.; Svedujo: Carlén, s-ro E.

Por "Gepatra Bulteno": Germanujo: Schmidt, s-ro G., 3,81.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

Helsingör

La internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingör okazos 19.-26. de julio en La Internacia Altlernejo (tute moderna). Venu al Danlando por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Aabyhøj, Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Aarhus, Danlando, 18. - 24. de okt. Programo baldaŭ havebla ĉe L. Friis.

KONTAKTO POR 5 GULDENO!!

Ĉu ankaŭ vi havas amikojn, kiuj ankoraŭ estas sub la aĝo de 26 jaroj, kaj kiuj ŝatus ricevi "Kontakto"-n? Vi povas fari al ili plezuron, atentigante ilin pri la nova, reduktita abonotizo de "Kontakto" por junuloj. Ĝis nun la abonantoj de ĉiuj aĝoj pagis po 8,— gld., sed TEJO decidis doni al la junularo la eblecon de pli malmultekosta abono: po 5,— gld. por tuta jaro. Vi povas helpi al TEJO, varbante viajn junajn amikojn jam por 1970! Sendu la abonojn al la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002.

KOMPOSTO-LABOROJ?

La Centra Oficejo de UEA akceptas mendojn por kompostado IBM por ofseta preso. Petu oferton, informante pri amplekso, litertipo kaj litergrandeco, kompost-maniero ktp.

Kial ne?

La novformata bulteno de junularo esperantista brita.

10 ŝ. (\$ 1.20) jare.

Robert Purvis, Assoc. Soc. Hall, 10 Nicolson Street, Edinburgh EH8 9DH, Skotlando

En 1970 aperos:

ABZ de Amo

de la danaj verkistoj Inge & Sten Hegeler.
La plej vendata libro de sia speco en Danlando — enciklopedio pri la kunvivo de plenkreskaj homoj — verkita por plenkreskaj homoj. Petu senpagan prospekton ĉe la eldonejo. Reduktita prezo je antaŭmendo.



Eldonejo Torben Kehlet, Ystadvej 11,
DK 2850 Naerum, Danlando

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 49 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 18 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: \$ 4,50 (62 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

UEA rabatas la prezojn!

Por rapidigi la disvendon kaj elĉerpiĝon de pli fruaj eldonaĵoj — kaj por tiel regajni la rimedojn por eldoni novajn bezonatajn librojn, broŝurojn kaj diskojn — la Libroservo de UEA en 1970 draste tranĉis la prezojn de pluraj vendaĵoj. Jen la novaj prezoj en guldenoj.

			Malnova prezo	Nova prezo
Reĝo Lear	La monde konata tragedio de William Shakespeare, tr. K. Kalocsay	Bindita	(16,50)	12,—
		Broŝurita	(14,—)	9,—
Angla Antologio	Unuaranga kolekto da poezio kaj prozo, redaktita de Auld kaj Rossetti	Bindita	(10,—)	5,—
Festparolado 1964	Duobla disko (33 t/m) de unu el la plej brilaj paroladoj de Ivo Lapenna	Daŭro: 30 min.	(3,—)	2,—
Salutparoladoj	Disko (33 t/m) kun mallongaj salutoj de tridek kongresanoj, Hago, 1964	Daŭro: 15 min.	(1,50)	1,—
Oriento kaj Okcidento	Kontaktoj inter orientaj kaj okcidentaj mondpartoj tra la jarcentoj, ilustritaj	Broŝurita	(1,50)	0,75
La Esperanto-societo	Artikoloj pri loka agado (Lapenna, Becker, Wensing, Jaumotte), ilustritaj	Broŝurita	(1,50)	0,50
Belarto I & II	Du allogaj kajeroj da literaturaj, originalaj kaj tradukitaj, red. Auld	Broŝ., po	(2,—)	0,50
Monda Kulturo	Ankoraŭ disponeblaj estas la numeroj 1 kaj 4-15 de tiu kultura revuo	Broŝ., po	(2,—)	0,50
La Praktiko	Kompletaj jarkolektoj, 1964, 1965 aŭ 1966, taŭga legaĵo por komencantoj	Nebind., po	(5,—)	1,—

Mendante, bonvolu kunsendi la pagon kaj aldoni 10 % por la sendokostoj. Mendojn adresu al:

Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando

41-a Itala Kongreso de Esperanto

Dato: de la 19-a ĝis la 26-a de septembro 1970.

Loko: Mediteranea Maro

Kongresejo: Ŝipo "CARIBIA" (24 500 toneloj - 27 sociaj kunvenejoj - 3 restoracioj - 3 orkestroj - 4 naĝejoj - ĉiuj kajutoj klimatizitaj)

Laboroj: en plaĉa kaj komforta medio, sen tempoperdoj por atingi hotelojn kaj serĉi restoraciojn.

Haltoj kaj ekskursoj: en la "7 Mediteraneaj perloj", Genova - Cannes - Barcelona - Palma de Majorca - Bizerte (Tunis) - Palermo kaj Capri (Napoli), kun posta reveno al Genova.

Inaŭguro: en Genova antaŭ la enŝipiĝo.

Kotizoj: ekde 69 000 it. liroj por la tuta semajno, inkluzive de ĉio, kun aranĝo en 4-litaj kajutoj turist-klasaj. Kroma rabato por gejunuloj ĝis 25-jaraj. Senpaga aliĝo por eksterlandanoj.

Korespond-adreso: Torina Esperanto-Grupo, 41-a Itala Kongreso de Esperanto, Poŝtkesto n-ro 198, I-10121 TORINO, Italujo.

RIMINI ATENDAS VIN

La 22-a IFEF-Kongreso okazos en 16-22 majo 1970 en Rimini, la "Strando de Eŭropo". Venu multnombre!

La ekskursoj okazos al San Marino, al Ravenna kaj al Bologna, en kiuj lastaj du oni inaŭguros Zamenhof-stratojn. La prezo de la kompleta pensio en Rimini: £ 2000 tage.

Informojn: 22-a IFEF-Kongreso, Via Donato Creti 61, I-40128 Bologna, Italujo. Post la 1-a de majo adresu: ĉe "Dopolavoro Ferroviario", Viale Regina Margherita 109, I-47037 Rimini, Italujo.

ANONCO EN "ESPERANTO"

atingas pli da legantoj en pli da landoj, ol anonco en kiu ajn alia Esperanta revuo. Tarifo: tutpaĝa anonco = 285,— gld.; 1/2-paĝa = 150 gld.; 1/4-paĝa = 85,— gld.; 1/8-paĝa = 50,— gld.; 1/16-paĝa = 35,— gld. Kliŝokostoj estas ekstreme kalkulataj. Rabato por senŝanĝa ripeto: 20 %. Oni bv. adresi anonco-mendojn al la Centra Oficejo de UEA.